& Pluvaj ferioj ĉe l' mara bordo:

< Rekante 13 el 25 batoj por strofo, entute 250 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo kaj disduigo na strofoj. Klarigo (*): '5 Monunuo, francavro.>

(#Melodio:

<:25> (

/so laso fami; mi fami redo; so laso fami; mi redo mi;

(#Rekantaĵe: re remi fare mire domi reTi do; so miso fami fa re mi)

)×10)+

(&Strofoj:

'1 /Ventego blovas, ; Ĝi nubojn ŝovas ; Kaj ondojn movas ; ĉe mara bord',

(×:; **Dance nun tretu kaj ripetu vortojn ĉi ; kaj la rakonton aŭdos ni**.)

'2 Mi dumferie ; Nun sidas tie. ; Atendas pie ; Sub mia pord'... .....

'3 Dum pluvo bruas ; Kaj vento skuas ; Mi malenuas ; Kun vinbotel', ...

'4 Kaj ĝojas vere ; Pri la vetero ; Nur la kelnero ; De la hotel'. .....

'5 En lit' mi restas, ; Glacie frostas, ; Kaj tio kostas ; Dek frankojn* pli! .....

'6 Vi min ĵaluzas ; Kaj eĉ akuzas, ; Ke mi amuzas ; Min tie ĉi! .....

'7 Ho, mi atestas, ; Feliĉa estas ; Nur kiu restas ; En sia dom' ; .....

'8 Mi vin envias; Kaj vi ne scias, ; Ke VI ferias, ; Vi stulta hom'! .....

'9 Dum pluvo bruas ; Kaj vento skuas ; Senhalte fluas ; Nun nazkatar'... .....

'10 Maro, adiaŭ! ; Prenos hodiaŭ ; Min ĉe l' stacio ; La vagonar'! .....)